Kongresa numero 3. Eldonnombro 3500 ekz.

„Mutig vorwärts!“

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, por ĝeneblaj ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

Nro 3 (128 en la vico) Korneuburg ĉe Wien, la 5. de marto 1936. 13. jaro

Robert Kreuz †

Antaŭ nur kelkaj semajnoj mortis nia ŝatata iama prezidanto de ICK, nia bonkora **John Merchant,** kaj nun lia multjara fidela kunlaborinto **Robert Kreuz,** direktoro de UEA foriris el ĉi tiu mondo.

Ankoraŭ antaŭ Novjaro ni renkontiĝis en Vaduz por priparoli gravajn demandojn pri la 28-a kaj li sentis sin bone, kiel li diris al mi.

Despli ne atendite venis la 1. de februaro matene telegramo al mi el Genève: „Kreuz mortinta ĉinokte. UEA-oficejo.“

La subita morto estas forta bato por nia movado, ĉar Kreuz ne nur konis ĉiujn detalojn de la internacia movado, sed ankaŭ sciis tre lerte aranĝi kun malmultaj rimedoj eĉ grandajn aferojn, konferencojn ktp. Lia ega energio kaj laborkapableco kaj forta laborvolo igis lin kapabla plenumi la unuan punkton de la laborprogramo post Stockholm. Estis malfacila, nervostreĉa laboro ekvilibri en 1935 la budĝeton de UEA, kiu antaŭe neniam estis aktiva. Li certe post mallonga tempo estus povinta havigi al UEA pli grandajn rimedojn, por ebligi al ĝi, plenumi la altajn taskojn de internacia organizo.

Ni estis „sur la marŝo al pli bona estonteco“ kaj ĵus en ĉi tiu momento la senkompata morto forrabis lin de ni. Ne facile estos por nia komitato trovi homon, kiu anstataŭu lin!

Robert Kreuz naskiĝis la 2. de julio 1894 en Mainz. Li konatiĝis kun E. jam 14-jara kaj post la milito li dediĉis sian tutan liberan tempon al revivigo de SOL (Sudokcidentgermana E-Ligo) kaj starigo de bona kontakto kun REVELO (Rejnlanda Vestfalia E.-Ligo). Li gvidis la E.-propagandon por Frankfurta Internacia Foiro. Por dediĉi sin tute al sia amata Esperanto, li eksiĝis el bone pagata posteno en grava industria entrepreno kaj fariĝis la 1. de julio 1923 direktanto de E.-fako ĉe firmo T. & H. Jung en Horrem kaj kunredaktoro de la semajna gazeto „Esperanto Triumfonta“ (nun „Heroldo de Esperanto“), kie li restis ĝis 31. de okt. 1924. — 1925 li fariĝis ĝenerala sekretario de Internacia Centra Komitato, en 1930 ĝia direktoro, 1933 post „Interkonsento de Köln“ dua direktoro de UEA kaj 1934 en Stockholm sola direktoro.

Kreuz krom sia oficiala laboro havis multajn aliajn interes- kaj laborkampojn kaj oni devis miri, kiamaniere li kapablis tion ĉion fari. Li kunlaboris en diversaj E.-gazetoj, publikigis aron da valoraj verkoj, parte originalaj, parte tradukaj kaj estis sperta pri lingvoj, bona oratoro kaj bonega interpretisto, perfekta stenografo.

Kreuz estis membro de Lingva Komitato kaj Komerca Konsilisto de Princlando Liechtenstein.

Li estis la plej bonkora homo, sed li neniam forlasis la realan bazon kaj neniam estis por fantaziaĵoj aŭ utopiaĵoj. Kaj ĝuste tiajn sobrajn, praktike laborantajn entuziasmulojn nia movado bezonas!

Nun la morto lin forprenis en tute netaŭga momento, ĉar lia laboro nur estis komencata. Ne estos facile trovi sufiĉe taŭgan postsekvonton, ĉar li estis unu el niaj plej kapablaj homoj kaj vere 100 % esperantisto.

Mi ĉeestis lian enterigon kaj preskaŭ pro tro granda ekscitiĝo ne povis paroli miajn adiaŭajn vortojn, kiuj sekvas sur la alia paĝo.

Steiner

Kara direktoro Kreuz.

La esperantistaro, unuigota flanke de reprezentantoj el multaj landoj en la 28-a Universala Kongreso de Esperanto, funebras ĉe via ĉerko kaj sendas al vi kiel sian lastan saluton ĉi tiujn florojn.

Sed via nomo, via laboro, via senlaca klopodado por Esperanto kaj la rekonstruo kaj florado de Universala Esperanto-Asocio kaj per tio por la tuta Esperanto-movado restos por eterne en la historio de Esperanto mem.

Ne tro multaj samideanoj scipovis kaj scipovas ankaŭ nuntempe ĝuste taksi viajn meritojn, kompreni la grandajn oferojn, kiujn vi faris al Esperanto, kaj kiuj oferoj kaŭzis ankaŭ, ke la bona Dio vin forvokis el ĉi tiu mondo en junaj jaroj, tiel frue, certe tro tro frue.

Al aro da esperantistoj ne plaĉis via ŝajne kruda ŝelo, via energio, via celkonscia laboro. Sed viaj kunlaborintoj ĝuste taksis vin, ili vin konis tre bone kaj sciis, ke sub la kruda ŝelo estis varmsenta koro, bonkora homo, ĉiam helpopreta sen multaj vortoj. Ilin ne ĝenis via energio, kara Kreuz, viaj amikoj ŝatis ĉi tiun energion, ĉar nur per ĝi vi povis tiom labori por Esperanto, eĉ tro multe labori.

Via laboro, kara Kreuz, donis kaj donos belajn fruktojn al nia movado kaj, ke vi tiel juna devis morti pro tia alta celo kia estas Esperanto, estu la sola konsolo, kiun ni povas doni al via ŝatata vidvino.

Fiera ŝi estu, fiere ŝi ĉiam pensu pri vi kiel la tuta movado hodiaŭ ĉe via ĉerko fiere funebras.

Akceptu ankaŭ kara direktoro la lastajn salutojn de Internacia Esperanto-Muzeo, de Aŭstria Esperanto-Asocio, de Aŭstria Esperantisto kaj de mia familio.

Mi mem neniam vin forgesos, kara amiko, kaj vi ne nur mankos al mi en la preparaj laboroj por la kongreso kaj en la kongreso mem, sed ankaŭ al la tuta kongresanaro, kiu de multaj jaroj la unuan fojon devos esti sen vi.

Ripozu en paco, kara juna amiko!

Karaj kongresanoj!

Vi ĉiuj legis pri la morto de nia meritplena direktoro Robert Kreuz.

Bedaŭre lia vidvino postrestis en neesprimeble malagrabla ekonomia situacio. Li ne postlasis monon, ĉar li vivis de sia salajro en la multekosta Genève, kaj ankaŭ ne estis asekurata, ĉar neniu asekur-societo volis lin akcepti.

Nia UEA ne havas la monon, doni al la vidvino, kio alie ĉe ĉiuj entreprenoj estas kutimo, almenaŭ tri-monatan salajron.

Tial nia prezidanto generalo Bastien faris alvokon al la landaj asocioj, por ke ili kolektu monon, transdonotan al la vidvino.

Nia komitato nun pensis, ke la kongresanoj, kiuj tiom ofte uzis la servojn de nia elmondiĝinta ĝenerala sekretario de Universalaj Kongresoj de Esperanto, volonte donos ankaŭ sian oboluson kaj ni petas, ke ĉiu el vi donacu ion por nia kolekto. Ni akceptos moneron kaj publikigos la sumojn en niaj kongresnumeroj.

Ni atendas, ke neniu postrestu, kaj ke ni havos la okazon transdoni al la vidvino sufiĉan sumon, por ke ŝi povu transloĝiĝi al sia patrujo kaj tie havigi al si novan ekonomian situacion. LKK.

Al la Universala Kongreso en Vieno 1936.

Bonvenon gefratoj kun lingvoj diversaj!
Akceptu kaj uzu kun ĝoj' Esperanton!
Hodiaŭ nur servu la universala
Ĝi estas de l'Majstro la verk' ideala.
Se ankaŭ nacioj malsamaj ĉeestas
Do ĉiuj fratame kongreson ni festas,
Kunvenis hodiaŭ por efektivigi
La revon de l'Majstro, homaron pacigi.
Ni Esperantistoj kun verda standardo
Por ni ne ekzistas mortiga ponardo,
Batalas nur pace kaj venkos finfine
Ne ĉesas labori, fervore obstine.
Armiloj por ni estas paco kaj amo
En koro la nia ekbrulas la flamo
Per kiu degelas de l'koro glacioj,
Per kiu komprenas sin ĉiuj nacioj.
Dank' al la protekto de l'kanceliero
Ekfloras sur bela aŭstria la tero
Gastam' al fremduloj nun per Esperanto.
Valora trezoro al ĉiu lernanto.
Ĝi estas donata al la infanaro
En niaj lernejoj de l'instruistaro.
Do pluen ni paŝu nun jaron post jaro
Ke kresku la vicoj de nia anaro!
La vojon al paco ne ĉesu fosadi,
Per a m o ni volas la mondon invadi!

Kanjo Haselbauer.

Federacia Prezidanto de Aŭstrio s-ro Wilhelm Miklas afable akceptis la Protektoraton.

Kongresejo: La salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.

Leter-kaj telegramadreso: Esperanto, Wien, Hofburg.

Somera Universitato: Ankaŭ anoncis sin la Registaro de Nederlando, kiu sendos kiel sian reprezentanton s-ron inĝ. Isbrücker.

Kongreskotizoj:

Favorkotizoj, **validaj ĝis 30. de aprilo:**

I.	Kongresano	svisaj fr. 23.—
II.	Kotizo por familianoj de kongresano	„ „ 14.25
III.	Kotizo por gejunuloj malpli ol 18-jaraj	„ „ 9.50
IV.	Kotizo por helpkongresanoj, kiuj ricevos ĉiujn dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton	„ „ 12.—

Pri **enpagmaniero rigardu kongresnumeron I.**

La **programo** estos publikigata en n-ro 4.

Vizo: Senpaga envojaĝo al Aŭstrio kun valida pasporto, escepte de senŝtatanoj kaj el USSR.

Kongresvojaĝo:

Preskaŭ 100 personoj jam aliĝis. Por ili ni prizorgis tranoktejojn ankaŭ en Salzburg. Por pluaj 100 jam tiaj estas certigitaj en Salzburg. La poste aliĝontoj loĝos en la proksimeco de Salzburg kaj estos transportataj per niaj aŭtobusoj tien kaj reen. Tro malfrue aliĝontoj eble ne povos partopreni en la vojaĝo pro neebleco ricevi tranoktejon ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo dum ĉi tiu tempo de la Festludoj.

Senpaga vizo por la kongresanoj veturontaj al nia XXVIII-a en Wien tra Ĉehoslovaka Respubliko.

Laŭ dekreto Nro. 162.872/V-4/35 el 13. I. 1936 ministerio de eksterlandaj aferoj en Praha sciigas al petskribo de Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha, ke la ministerio komisiis ĉsl. legacion doni al partoprenontoj de nia XXVIII-a en Wien — veturontaj tra Ĉehoslovakio — senpagajn vizojn ĉehoslovakajn.

Rabatoj sur fervojoj:

Aŭstrio. 25% rabato sur la fervojo por tien- kaj reveturado kaj 60% de la reveturprezo, se vi pagis la tutan tienveturadon al Vieno kaj restis tie 7 tagojn. — Sur la ŝipoj de Donau-Dampfschiffahrts-Kompanio 25% por simpla veturado tien aŭ reen, ĉu sur la linioj de Passau aŭ de Giurgiu. Sur la lasta linio el stacio post Budapest ĝis Giurgiu al Vieno kaj returnen vi nur pagos la prezon por unu vojaĝo (la laŭflua).

Ĉehoslovakio. Fervojministerio donas al la kongresanoj ĉu ĉehoslovakoj aŭ alilandanoj 25% rabaton je speciala legitimilo, kiun donas la fervojdirekcio en Praha post prezentado de koncerna listo de la traveturantoj. Tiun aferon prizorgos por ĉiuj en afabla maniero „Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha-Smichov 100 (s-ano Bloch)". Bonvolu mendi, aldonante 3 respondkuponojn por la elspezoj, legitimilo kaj leterafranko, kaj mencii: Limstacio, tra kiu vi eniras kaj kie vi eliras al Aŭstrio kaj la sama por la revojo, ĉu vi veturos en 2. aŭ 3. kl. kaj ĉu per rapid- aŭ ordinara trajno. Ne forgesu skribi kaj mendi!

Germanujo: Rabato de 20% travojaĝante Germanujon por la vizito de la Kongreso. Bileto de Sassnitz ĝis Bodenbach 2. kl. Rm 56.65, 3. kl 37.10. — 40% rabato por tiuj kiuj venas per ŝipo al Königsberg aŭ al limstacio kontraŭ Litovujo kaj Polujo kaj de tie veturas trans Orientprusujo. De Königsberg al Bodenbach **kaj reen** 2. kl. 68.60, 3. kl. 45.05. — Je komuna vojaĝo de minimume 25 pers. de norda germana limstacio ĝis Bodenbach 40% rab. — Necesas, ke ĉiu nordlandano, traveturonta Germanujon, tuj skribu al Komercista Esperanto-Unio, Dresden-Radebeul, Friedrich-August-Straße 4, pri la elekto vojo, por ke ni notu kiom da personoj interesiĝas pri la rabatitaj biletoj. Ni post certa tempo informos la interesulojn, ĉu vojaĝo

...% estas ebla. Post nia avizo estas necese ...ndi al ni kelkajn semajnojn antaŭ la kon... ...peso la monon, por ke ni aĉetu la biletojn. Por niaj elspezoj necesas pago de ...m 2.—. — La s-anoj en Dresden intencas ...rangi belan restadon. Venu Dresdenon, koran ...bvenon! KEU.

Hungarujo. En kaj eksterlandaj kongresanoj ...r vojaĝo tra Hungarujo 25—33% rabaton, ...ldan por la vojaĝo al Vieno O h la 3. de ...g. ĝis la 12. h de l' 15. aŭg.; por revojaĝo ... aŭg. de 12. h ĝis 20. aŭg. 24. h. — Apartaj ...erdkoloraj vojaĝatestoj estos presataj de ni; ...i kostas po peco 1 pengon; mendu ilin ĉe ni ...gante tiun pengon. Hungara E.-Federacio, ...dapest.

Italujo. Por la partoprenantoj en la 28-a la ...eneraldirekcio de Italaj Statfervojoj donas ...r italoj aŭ aliaj kongresanoj 30% rabaton ...i por la veturado al la kongreso aŭ reen aŭ ...r ambaŭ vojoj. Por la vojaĝo al Vieno la ...bato validas de 1.—20. aŭg. por la reveturo ...e 16.—31. aŭg. Por ricevi ĉi tiun rabaton ...nu vin al la oficejoj de CIT, Compagnia ...liana Turisma, en via lando kaj vi ricevos ...necesajn dokumentojn, kiujn vi devos montri ...la fervojstacio kune kun via kongreskarto ...enigitajn.

Malmultekostaj tranoktejoj estos disponigataj ...r malbonvalutuloj kaj tiuj personoj, kiuj por ...ri la veturkostojn, venos per biciklo. Sed ...i devos baldaŭ anonci sin, alie ni ne povos ...rantii por tia malmultekosta tranoktejo.

Senlaboruloj anoncu vin al la Kongres-...komitato al kunlaboro dum la kongreso. ...i havos okazon partopreni senpage en ...kaj aranĝoj laŭ viaj servoj kaj eĉ gajni ...monon.

3. listo:

1. Mage Emile, Lyon.
2. Borel Emile, Radiostaciestro, Lyon.
3. Borel Marie s-ino, Lyon.
4. Chappuis Jeanne, Villefranche-sur-Saône.
5. Jullien Yvonne, telefonkalkul-ino, Lyon.
6. Broussard, Villefranche-sur-Saône.
7. Fachinotti, d-ro Guido, apotek., Valenza.
8. Fachinotti Vecchio Giacomina, Valenza.
9. Robba, d-ro Francesco, bienisto, Valenza.
10. (Bl.) Musella Vincenzo, ŝtata prof., Roma.
11. Kermel Alfons, majstro en fabriko. Neu-Oderberg, ČSR.
12. Procházka Julius, lernejestro, Syrovice.
13. Baird Jane, inst-ino, Edinburgh, Skotl.
14. Peschke Herma s-ino, Cieszyn, Polujo.
15. Kempeneers, d-ro Paul, kurac., prez. de Belga Ligo Esp., Uccle.
16. Kempeneers s-ino, Uccle.
17. Lesková Ružena, ofic-ino, Vodňany, ČSR.
18. Gilliard Jules, meĥanika ilaristo, Neuveville, Svislando.
19. Gehrmann Josef, Recklinghausen, Germ.
20. Gehrmann Theodor, Recklinghausen.
21. Kraay Anthonia, den Haag.
22. Kraay Edith, den Haag.
23. Tomášková Marie, studentino, Vodňany.
24. Brakel J. D., bankofic., Rotterdam.
25. Brakel-Boerenbrink C., s-ino, Rotterdam.
26. Adamek Karl, lernejestro, Záblatí, ČSR.
27. Adamková Marie, s-ino, Záblatí.
28. Jaquillard Alexis, ŝtatofic. e. p., Lausanne.
29. Ananjev Vassili, bankofic., Tallinn.
30. Ananjew Natalie, telef-ino, Tallinn.
31. Allende Don Victor O. de, Bilbao, Hispan.
32. Fohren Amalia Christina, instr-ino, Rotterdam.
33. Pomerol E., kontisto, Boulogne-Billancourt.
34. Taylor Frank, asekuristo, Halifax, Angl.
35. Taylor Hannah, modistino, Halifax.
36. Nixon Violet C., instr-ino, Bournville.
37. Blaise Paul, komerc., Morden, Angl.
38. Mc. Auslan Frances W. M., London.
39. Strapps Phyllis Marjorie, instr-ino, Ilford.
40. Strapps Maria Jane, s-ino, Ilford, Angl.
41. Fraser Rachel G. M., Ilford.
42. Skinner I. L. F., f-ino, Seven Kings, Angl.
43. Berry A. B., f-ino, Prudhoe-on-Tyne.
44. Barnard Stan., London.
445. (Bl.) Inglis Thomas Valentine, instr., por blind., Edinburgh.
446. Inglis Elizabeth, s-ino, Edinburgh.
447. Scott Janet Kay, skrib-ino, Edinburgh.
448. Malley Ernest C., ĉarpentisto, Garstang.
449. Lawy O. M., instr-ino, Birtley, Angl.
450. Noble O., instr-ino, Darlington, Angl.
451. Wooding Noel, Leicester, Angl.
452. Graves Alice Mary, s-ino, Alford, Angl.
453. Guillaume Jean, inĝ., Les Lilas, Franc.
454. Waringhien Gaston, prof., prez. de Franca E.-Instituto, Lille.
455. Poly Pierre, Paris.
456. Loyola Galar, d-ro Julian, kurac., Logroño, Hisp.
457. Perea de Loyola Candida, s-ino, Logroño.
458. Ferran Gabriel, honora prof., Tours.
459. Ferran Marthe, honora prof-ino- Tours.
460. Pacquez Gustave, dir. de Supera Lern., Calais.
461. Pacquez Blanche, s-ino, Calais, Franc.
462. Rameau Marthe, komerc-ino, Limoges.
463. Douay Marguerite, stenograf-ino, Paris.
464. Claude Marcelle, stenogr-ino, Paris.
465. Volqueman Marcel, instr., Lille, Franc.
466. Volqueman Jeanne, instr-ino, Lille.
467. Mauprime André, ofic., Houilles, Franc.
468. Mauprime Yvonne, Houilles.
469. Schirbir Mathilde, Bordeaux, Franc.
470. Schirbir Marthe, Bordeaux.
471. Cartier Thérèse, Beauvais, Franc.
472. Ruchon Maurice, gipsisto-pentr., Bourg-de-Péage, Franc.
473. Senez Lucile, dir-ino de Supera Lern., Saulien.
474. Hollier Madelaine, prof-ino, Saulien.
475. Clausse Henri, dir. de Kolegio, Calais.
476. Bernier, f-ino, dir. lern., Raismes-Sabatier.
477. Gillon Marie-Louise, Dijon, Franc.
478. Berland, prof., Auxerre, Franc.
479. Constant, f-ino, Toulon.
480. Saudin, f-ino, flegistino, Rouen, Franc.
481. Martone Marie, Philippeville, Alĝerio.
482. Rezzaghi, kontoristo, Houilles, Franc.
483. Rezzaghi, s-ino, ofic., Houilles.
484. Chanot, s-ro, Houilles.
485. Chanot, s-ino, Houilles.
486. Tinel Marie Thérèse, ofic-ino, Les Andelys.
487. van Ás J., Antwerpen.
488. Jennen Antoinette, Bruxelles.
489. Olsson Elisabet, instr-ino, Stockholm.
490. Houtsma O. E. A., Doetinchem, Nederl.
491. Houtsma, s-ino, Doetinchem.
492. Hellinx Annie, muzikstud-ino, Hilversum.
493. Lossos Carl, insp. e. p., Graz.
494. Stiegler Johann, reallernejano, Graz.
495. Mudrak Marie, s-ino, Wien.
496. Landerouin René, poŝtofic., Sepmès, Franc.
497. Groverman Robert, advok., Gentbrugge.
498. Gasperini Gustav von, ofic., Graz.
499. Ikegava Kiyoshi, Osaka, Japanujo.
500. Ács Ferenc, Székesfehérvár, Hungar.
501. Abel Franz, instr., Wieselburg a. d. Erl.
502. Crignis Anna Gretl de, Wien.
503. Gassner Josef, gimnaziano, Parsch.
504. Esperantista Klubo, Č. Budějovice, ČSR.
505. Kaps Josef, helppastro, St. Johann i. P.
506. Ulbrich Rudolf, poŝtoficejestro, Riedau.
507. Denks Anton, Wien.
508. Schraml Oswald, instr., Spielberg.
509. Zago Attilio, Villafranca Veronese.
510. Tomasek Anna, E.-instr-ino, Wien.
511. Weinek Magda, ofic-ino, Wien.
512. Stöckl Martin, Innsbruck.

Laŭlanda resumo: Alĝerio 2, Anglujo 63, Aŭstralio 2, Aŭstrio 152, Bulgarujo 4, Belglando 6, Ĉeĥoslovakio 44, Danlando 6, Egipta Sudano 2, Estonujo 19, Finnlando 1, Francujo 95, Germanlando 10, Hispanujo 3, Hungarlando 6, Irlando 2, Italujo 14, Japanujo 1, Jugoslavio 1, Katalunujo 1, Nederlando 30, Nederl. Hindujo 1, Polujo 9, Rumanlando 10, Skotlando 8, Svedlando 10, Svislando 7, Usono 1. Entute aliĝis 512 personoj el 28 landoj!

Belgujo. D-ro Kempeneers, prez. de Belga Ligo Esp., faris paŝojn por ricevi por la kongresanoj rabaton.



Waidhofen a. d. Ybbs, en la abatejo.

Gravaj fakkunsidoj!

Niaj gazetoj afable diskonigu ĉi tiujn alvokojn!

Por reorganizi la esperantistajn fervojistojn en unu granda Ligo, mi nome de multaj fervojistoj el diversaj landoj invitas ĉiujn esperantistajn fervojistojn aliĝi al

Fervojista Ligo Esperantista (FLE),

kiun ni deziras fondi dum fakkunsido dum la 28-a.

Tiu ĉi FLE nepre estu parto de nia UEA.

Grave por niaj kolegoj estas, ke ni per ĉi tiu Ligo deziras helpi ilin en ĉiu maniero: doni informojn pri fakaj aferoj, gvidi ilin dum iliaj vojaĝoj tra la instalaĵoj de la fervojoj en la vizitataj landoj kaj urboj, eventuale eldono de regula folio faka (*informoj fakaj el diversaj landoj*), interŝanĝa akcepto de niaj infanoj dum la *ferioj ktp.*

Sendu konsenton, ideojn kaj konsilojn al la aranĝanto de la fakkunsido kaj proponanto de FLE.

Gottf. Heidl, Linz, Waldeggstr. 52.

Al la instruistaro!

Unu el la plej gravaj fakkunsidoj estu tiu de TAGE kun la ĉeftemo „Esperanto kiel devigan fakon en la lernejon! Ĝis nun jam aliĝis multaj instruistoj kaj ili nepre ĉeestu ĉi tiun kunsidon.

Bonvolu jam nun sendi al mi proponojn *kaj instigojn.*

Lernejinspektoro registara konsilisto **Fr. Stengel,** Wien, I., Neue Burg (Esperanto-Kongreso).

Fakkunsido Virina (U. D. E. V., Unuiĝo de esp-istaj virinoj) okazos la 14. aŭg. post „Internacia Konferenco de Virinoj". Proponojn ktp. al s-ino Frieda Feichtinger, Wien, XIII., St. Veitgasse 76.

La prespublikigo de la **Raporto** pri la **„Internacia Konferenco,** Wien, 19.—24. Majo 1934" („E en lernejo kaj praktiko") pro la fakto, ke venis nur tre malmultaj mendoj, bedaŭrinde ne povis okazi. La mendintojn de la nomita raporto ni informas, ke ili kompense ricevos la raporton pri la 12. Somera Universitato, Wien 1936 aŭ laŭdezire, ili povas rericevi tuj sian monon, informante nin per simpla poŝtkarto.

Aŭstria Esperantisto.

Germanlingva ŝlosilo.

En **Albrecht-Dürer-Verlag,** Wien, VII., Bandgasse 28. Esperanto-fako, aperis la ŝlosilo germanlingva, 36-paĝa.

Prezoj: 10 g plus 5 g afranko en poŝtmarkoj; ĉe 5 ekz. afranko senpaga, ĉe 10 krome senpaga aldono de 1 ekz, ĉe 50 de 7, ĉe 100 de 15 ekz. Mendu ĉe la eldonejo. AEA transprenas ankaŭ mendojn kaj sen rekompenco transdonos al la eldonejo.



Abatejo Melk, tronanta sur alta roko.

(Represo en E.-kaj naciaj gazetoj petata!)

Internacia Konferenco de Virinoj

kun la temo:

„La reakcio de la politika kaj ekonomia situacio de Eŭropo sur la situacion de la virinoj."

En la kadro de la 28-a okazos vesperkunveno de la virinoj en granda festsalono de Hofburg (imperiestra kastelo), la 12. de aŭg. je la 18 h kun la supre menciita temo, aliĝante al la temo de Somera Universitato.

Jam nun 28 nacioj anoncis delegitojn al la Kongreso.

Al la inoj, partoprenantaj en la Kongreso, certe tre plaĉos, ke la temo de Somera Universitato ankaŭ estu pritraktota el la vidpunkto de la virinoj.

Je ĉi tiu kunsido estas paroladoj allasataj en germana, franca, angla kaj Esperanto-lingvoj, kun traduko en Esp.

La respondkonsciaj kaj spirite viglaj virinoj de ĉiuj kulturnacioj sentas en la nuna mondsituacio pli forte sian solidarecon, la saman direkton de siaj timoj kaj esperoj. Ili ankaŭ rekonas la gravecon de publika defendo de tio, kion ilia konscio kaj la al ili donita respondeco kiel virinoj kaj patrinoj postulas.

„Bund österreichischer Frauenvereine" (Ligo de Aŭstriaj virinaj asocioj) tial laŭ invito de la Kongres-Komitato deklaris sin preta transpreni la gvidadon de la Virina Konferenco kun helpo de „Unuiĝo de esp-istaj virinoj".

Ni tial invitas la virinojn, unuigitajn en la Virinaj Naciaj Ligoj kaj en Unuiĝo de esperatistaj Virinoj, partopreni en la 28-a Univ. Kongreso de Esp. kaj unuavice en la VIRINA KONFERENCO, por montri sian intereson por la virinaj demandoj kaj por la disvastigo de la mondhelplingvo Esperanto en la servo de la virinaj problemoj.

Ligo de Aŭstriaj Virinaj Asocioj
Prezidantino: Marie Hoheisel
Wien, IX., Sensengasse 5.
Unuiĝo de Esp-istaj Virinoj.

Al la homaro!

Homoj ni estas —
Eĉ se nacio,
Aŭ religio
Estas aliaj —
Homoj ni estas,
Gefratoj ni restas.
Etendu la manon
Al mi, kara homo!
Parolu al mi
En la lingvo espera
Konstruante estonton feliĉan,
Estonton de l' tuta homaro,
Unuiĝinta, pacema, anime altstara!

Adolfine Felzmann.

Salzburg,

la urbo de Mozart kaj de la Festludoj.

Istambul, Napoli kaj Salzburg, tiuj tri urboj estas laŭ Alexander de Humboldt la plej belaj en Eŭropo. Istambul kaj Napoli estas tiel malproksimaj de centra Eŭropo, ke ili estas apenaŭ rigardeblaj kiel reprezentantoj de Eŭropa urbkaraktero. Sed Salzburg, la ĉefurbo de la Aŭstria federacia lando samnoma, plene meritas esti laŭdata kiel plej bela urbo en Eŭropo.

La beleco de Salzburg havas du fontojn, kiuj kunfluas en ĝi al unike harmonia impreso: la naturon, kiu kreis pejzaĝon same grandiozan kiel ĉarman, kaj kulturon, kiu dum la brila historio de la urbo kreis artkonstruaĵojn tiel riĉajn kaj stilperfektajn, ke ili formas ne nur ornamon, sed esencan konsiston de la urbo.

Salzburg situas en la norda parto de la Alpoj en serena ebeno, grandcirkle ĉirkaŭita de la altmontaro, kie la rivero Salzach, la ĉefrivero de la lando, fluas inter la du montetoj Mönchsberg kaj Kapuzinerberg, proksime al la okcidenta limo de Aŭstrio. De München, la ĉefurbo de la apuda germanregna lando Bavarujo, ĝi estas per rapidtrajno atingebla en du horoj. De kiu ajn flanko oni alproksimiĝas al la urbo, ĉiam unue salutas la vizitanton la fiera surroka fortikaĵo Hohensalzburg, kastelo el la 11a jarcento, konstruita sur la suda ekstremo de Mönchsberg. Superregante la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon, ĝi similas sorĉan kastelon, kiu gardas la eniron al la fabela regno de la altmontaro. Malproksimete en la sudo leviĝas la unuaj montoj el la ebenaĵo kaj malantaŭ ili gigante elstaras la mursimilaj flankoj de l' fama Untersberg, de Göll kaj Tennen-montaroj. Kaj ankoraŭ pli malproksime, en la suda parto de la lando Salzburg, estas la neĝmontegaro Hohe Tauern, trans kiun kondukas la nova Großglocknerstrato al Karintio. Por vidi tiun ĉi plimalproksiman ĉirkaŭaĵon de la urbo, estas rekomendinde, suriri — aŭ veturi sur la moderna aŭtomobilstrato — sur la monton Gaisberg, kiu leviĝas nur kelkajn kilometrojn oriente de la urbo je alteco de 1286 metroj super la marnivelo. Ĝi prezentas belegan ĉirkaŭrigardon al la alpmontaro de Salzburg kaj Bavarujo, al la urbo mem kaj al sep belaj lagoj, parte jam en la najbara lagodistrikto de Salzkammergut.

La urbo Salzburg havas mildan klimaton kaj estas agrabla somera refreŝigejo. Ĝi unuigas en unika maniero la ĉarmojn de la montaro, de la ebeno kaj riverkampo, eĉ pli la ĉarmojn de varia naturo kaj de artplena urbo en tia grado, ke en Salzburg oni tute ne sentas la kutiman malagrablan atmosferon de grandurbo; la urbo Salzburg kvazaŭ ne interrompas la naturan pejzaĝon, sed mem formas parton de ĝi.

La civilizacio de l' moderna tempo ne jam trovis eniron en tiun ĉi urbon. Ĉie spirito kaj stilo de inda kaj tamen afable hejmsenta pasinteco estas ankoraŭ vivantaj. Jam en la tempo de la Romanoj, antaŭ la komenco de nia kristana ero, komenciĝis la historio de la urbo. La tiama Romana loko nomiĝis Juvavum. Post la 5-a jarcento la lando kristaniĝis, ĉirkaŭ la jaro 800 Salzburg fariĝis sidejo de arĥiepiskopo. En la mezepoko kaj la unuaj jarcentoj de la novepoko la princoj kaj arĥiepiskopoj de Salzburg konstruigis la multajn artkonstruaĵojn, kiuj famigis la urbon.

Ne estas eble en mallonga artikolo priskribi ĉiujn konindajn detalojn de la Salzburgaj belaĵoj. Nur la plej gravaj arkmonumentoj estu menciataj: Jen estas la princepiskopa r e z i d e j o, granda konstruaĵo laŭ itala stilo, kun tri grandaj kortoj kaj multaj pompaj salonoj. Antaŭ ĝi estas la granda r e z i d e j a p l a c o kaj en ties mezo la marmora k o r t e g a p u t o, laŭdire la plej bela sur germana tero. Je la alia flanko de la placo troviĝas la sidejo de la l a n d a r e g i s t a r o kun fama sonorilturo. Proksime de tiu ĉi placo estas la k a t e d r a l o (germane: Der Dom), la artaĵa centro le la urbo. Ĝi estas la plej granda kaj plej perfekta renesanca konstruaĵo norde de la Alpoj, en la nuna formo konstruita en la jaroj 1614—28 sub la regado de princepiskopo Paris Lodron. Neniu povas sin deteni de la profunda impreso, kiun faras solena Diservo aŭ orgenkoncerto en tiu ejo de klasika kulturo.

Inter la multaj aliaj preĝejoj de Salzburg nomita ankaŭ la „Norda Romo", estas la arta vidpunkto plej menciinda la preĝejo de la Franciskanoj. En ĝi trinava fundamento laŭ Romana stilo el la 13-a jarcento kaj alkonstruita gotika ĥorejo el la 15-a jarcento malgraŭ la stranga artkontrasto formas harmonian tuton. Simila kontrasto kaj tamen harmonio estas trovebla en la stratoj de la urbo mem. Ĉirkaŭ la katedralo kaj la Rezidejo troviĝas distrikto, kiu memorigas pri princa regado: larĝaj stratoj flankitaj de la grandaj fasadoj de imponaj palacoj, grandaj interkomunikiĝantaj placoj kun multfiguraj putoj, monumentaj konstruaĵoj, kiuj distingiĝas malvarme kaj fiere de la ĉirkaŭaĵo alispeca. Kaj kontraste tiu ĉi princa distrikto, je distanco de nur kelkcento da paŝoj, la hejmsenta etvivaĵo de tipe malgrandburĝa urbo: mallarĝaj stratetoj, nature kreskintaj, kun riĉaj pordegoj kaj fenestraj balkonetoj, domembloj kaj elstaraj forĝitaj fertabuloj; laborema de malnova metiista diligenteco kaj komercista negocado, kiuj prosperis sub la protekto de la klerikaj princoj, konservante tamen sian tradician burĝan karakteron. En unu el tiuj stratetoj, Getreidegasse 9, naskiĝis en la jaro 1756 la plej fama filo de la urbo Salzburg, W o l f g a n g A m a d e u s M o z a r t. Li jam en knaba aĝo famiĝis kiel komponisto kaj majstro de la fortepiano. En 1781 li transloĝiĝis al Wien, kie li kreis siajn grandajn operojn. Gardemetro el la Viena antaŭurbo Wieden, kie Mozart en sia lasta vivjaro finis la operon „La sorĉa fluto", estis poste transportita al Salzburg kaj tie starigita sur Kapuzinerberg, monteto kun belaj promenejoj kaj elrigardoj al la montoj kaj la urbo.

Al la malnova famo de Salzburg kiel urbo de l'muziko aliĝis en la lasta jardeko nova famo de urbo teatra. La jam internacie konata reĝisoro Max Reinhardt ekkonprenis la unikan taŭgecon de la Salzburgaj artlokoj por teatraj prezentadoj altrangaj. Parte en la malnova rajdlernejo, kie estas nun enkonstruita la nova festludejo, parte sur la katedrala placo sub libera ĉielo okazas la famaj f e s t l u d o j „Ĉiu" de Hoffmansthal, la dramo „Faŭsto", operoj de Mozart, Wagner kaj aliaj. Ili okazas nun ĉiujare en la monato aŭgusto kaj allogas milojn da fremduloj al la arturbo Salzburg.

El la ceteraj vidindaĵoj de Salzburg estu ankoraŭ menciitaj la melankolia tombejo de S a n k t a P e t r o kun katakomboj en la flanko de M ö n c h s b e r g, la Benediktana Abatejo S a n k t a P e t r o, la kastelo M i r a b e l l kun belega ĝardeno, la iam

…iskopa palaco Chiemseehof, Mo…art-muzeo kaj Urba Muzeo kun mul…j arte aranĝitaj vidindaĵoj kaj granda …blioteko. Kelkajn kilometrojn sude de la …rbo, sed esence apartenanta al ĝi, troviĝas …tre vidinda plezurkastelo Hellbrunn, …onstruita en la jaro 1613, kun granda …rko, akvoartaĵoj kaj granda natur-teatro …rokoj, atingebla de Salzburg per …ktra tramo.

La nura priskribo de la Salzburgaj bel…j naturaj kaj artaj, la ĵus menciitaj kaj …j aliaj, kiuj estas same menciindaj, ne …as havigi al vi la ĝustan imagon pri …i ĉi unika urbo. Vi devas veni mem kaj …i kaj ĝui. Uzu la vojaĝon „Tra Aŭstrio" … la 28-a Universala Kongreso de …peranto, por viziti kaj rigardi la urbon. …izburg atendas, Aŭstrio invitas vin!!

Ernst Werner.

…omantiko sur la Insulo Ambon.

„KAWIN LARI" (perraba geedziĝo)

Pratempa tradicio.

RABANTO kaj RABITINO

En loka gazeto mi trovis raporton pri …rolado de Sinjoro Toulesolehuwy en …mboino pri laŭmoraj geedziĝoj en tiu …sulo kaj ĉirkaŭaj insuletoj, el kiu mi citas …sekvantajn liniojn:

„Ĉiu parolas kun ŝato pri tio, kion oni …me koniĝis. Ankaŭ ĉikaze, ĉar mem …skite el t. n. perforkura geedziĝo, mi …m interesiĝas pri ĉi tiu temo, morrajte …kciita.

La laŭmoraj geedziĝoj sur tiu insulo kaj …eĵaĵo, montriĝas triformaj: unue …aĵa" (libervola) geedziĝo, ĉe kiu la viro …dungigas al edziĝo, due „minta" (per…) kaj trie „lari" (perforkura) edziĝo. …lastnomita konsideras nur la konsenton …la knabino.

Se ĝi ambaŭflanke estas aprobita, sed oni …was la malon ĉe la gepatroj, la juna viro …m rajtas forrabi sian amatinon, kondiĉe …li tion faru atentante la regulojn, kiujn …stulas la moroj.

Se la forkuro faktiĝis, frue aŭ malfrue la …edziĝo ankaŭ devas okazi. Doto kaj …stoj formas alian aferon.

Interkonsentita forkuro

Post ĉi tiu klarigo, m. o. tre necesa, mi …mencu pritrakti la ĝustan temon, t. e. la …terkonsentitan forkuron", la gravan …taŭludon de la t. n. perforkura geedziĝo. …j laŭeble mi priskribos la aferojn laŭ …ivanta ordo:

Unue mi pritraktos la specon de la per…a geedziĝo ĉe la popoloj de la Hinduja …ularo, do ĝeneralan superrigardon, kaj …e la samon en Amboino kaj ĉirkaŭaĵo, …nkciita de la lokaj moroj, kaj trie, kiel …a leĝaro juĝas tian delikton, fine kion …as nia jurista prudento. Estas konate, ke …popolaj moroj, la laŭleĝaj kutimrajtoj ĉe …popolo en Hinduja arhipelago, knabin…bo leĝe estas aprobita se ĝi servas kiel …medo por okazigi geedziĝon, kontraŭ la …do de la gepatroj aŭ prizorgantoj, eĉ se …devas okazi kontraŭ la volo de la kon…ma knabino. Ĉi tia rabo do estas aŭ ŝajna …fakta, se ĝi estas ŝajna, ĝi simple formas …rton de la geedziĝa soleno.

Ĉe fakta rabo la knabino aŭ virino estas …kondukata kun aŭ sen sia permeso. …tiujn ambaŭ formojn oni trovas unu …ud la alia sur la insulo BALI.

La amboina modo prezentiĝas jena…niere: Se juna viro konvinkiĝis pri la

Radio Wien.

Ĉiun merkredon de 18 h 30—19 h E.-**kurso,** je la fino **„Informoj pri XXVIII-a".**

Vendrede la 13. de marto parolos direktoro Franz Menacher pri **„Vojaĝo tra Aŭstrio"** (Unua parto: Salzburg ĝis Gmunden) je la **22 h 40—22 h 50.**

amo de iu knabino aŭ virino al si kaj ŝi ankaŭ emas edziniĝi, dum supozeble la gepatroj aŭ familianoj rifuzos ŝian edziĝopeton, tiam oni fiksos tagon kaj horon por rabe forkonduki ŝin. La knabino siaflanke zorgas pri tio, ke ŝiaj havaĵoj je fiksita tempo estos enpakitaj. Sub sia kuseno ŝi tiam estos metinta leteron de sia amato al siaj gepatroj aŭ prizorgantoj, skribitan en florriĉa ligvo, sciiganta ke ili ne bezonas serĉi sian floron, perlon au gemon kaj ne bezonas zorgi pri ŝi, ĉar ŝi troviĝas en sekuraj manoj de li, kiu amas ŝin kaj intencas preni ŝin kiel edzinon je deca geedziĝo. Se eblas, oni metas en la dormĉambro botelon da arako aŭ brando kaj blokon da teksaĵo kiel pruvon pri la bona afero. Se mankas okazo, sufiĉas nura letero kiel atestaĵo.

C. A. A. Haccou, Batoe (Ned. Hindujo.)

Eluzado de Esperanto en praktikaj celoj.

En Sovjetunio ekzistas la monopolo regna de la eksterlanda komerco. Tial ĉi tiun tutan komercon kun la alilandaro gvidas la komisarejo de l' eksterlanda komerco, al kiu ĉiu Aŭstria ĉu komercisto ĉie fabrikposedanto povas skribi senpere al Moskvo. Se la mendoj estus tre grandaj, estus eble interkonsenti pri la kreditoj kiel tio ĉi estas aranĝita kun Germanio de Sovjetunio. Kvankam mi parolas pri la aŭstriaj civitanoj, sed sendube ĉiuj aliaj legantoj de „Aŭstria Esperantisto", al kiu ajn lando ili apartenus, povas korespondi kun Sovjetunia Komisarejo, eĉ se ili estas civitanoj de la landoj, kiuj ne havas diplomatajn rilatojn kun USSR.

Neniu petas de tiuj ĉi korespondantoj, ke ili amu la sovjetan reĝimon kaj malamu la reĝimon de sia propra lando; ili nur devas esti akurataj ĉu en la plenumo de la mendoj, ĉu en la pago por siaj mendoj. La sendera komerco kun la plej granda kaj la plej fortega kolektiva komercistaro en la mondo donos al ili tre grandan profiton. Eĉ tre malfortaj kaj malriĉaj firmaoj povas labori kun la komisarejo, kiu per sia forto kaj potenco povas subteni eĉ siajn malriĉajn agentojn.

Neniam la tiel nomata idea propagando de Esperanto povas tiel utili al la disvastigado de nia lingvo kiel la praktika uzado de tiu ĉi lingvo en komercaj rilatoj inter du diversaj reĝimoj, kiuj ambaŭ havos per tiu ĉi uzado tre grandan profiton.

Ne nur la kapitalistoj povas riĉiĝi, sed ankaŭ ni deziras, ke nia lando fariĝu kolektive pli kaj pli riĉa kaj, ke ĉiu senlaborulo povu trovi en ĝi bone pagatan laboron.

Vlad. Vladimiroviĉ Majnov, Leningrad.

Nova venko de Esperanto en Brazilio.

Poŝtmarko kun teksto en portugala lingvo kaj Esperanto.

Laŭ ordono de d-ro Marques dos Reis, ministro de l'Publikaj Laboroj, kaj iniciato de lia ĝenerala sekretario, d-ro Joaquim Licinio de Almeida, la Brazila Departemento de Poŝto

Ruino Dürnstein en Danubo-valo Wachau.

kaj Telegrafo, jus eldonis belegan memorigan poŝtmarkon okaze de 8. Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro. La teksto estas en Portugala lingvo kaj en Esperanto. Valoro 200 rejsoj, blukolora.

Kiu sendos al Brazila Ligo Esperantista, Av. Marechal Floriano 212, Rio-de-Janeiro, du resp. kup., ricevos en fermita letero 2 neuzitajn poŝtmarkojn.

El Tutmondo

Radio. Tallinn (ondo 410.04 m) dissendos la 15. marto 21.30—22.— met. bonhumoran duonhoron el la estona literaturo, prezentotan de konata estona aktoro.

La **Internacia Korespondo-Oficejo de IALA** (adr. Marta Moelke, Berlin-Steglitz, Hünensteig, 8-a, Germanujo) peradas senpage korespondadon inter geinstruistoj kaj gelernantoj de la tuta mondo.

Anglujo. La XIVa Internacia Tendaro de la Skolta Esperantista Ligo okazos 18.—29. julio apud Ipswich, Suffolk, Anglujo. Inter la Patronaro troviĝas la urbestro. Plenajn detalojn liveros sam. F. D. Murphy, 54 Constable Rd., Ipswich. Kosto de aliĝo kaj tendara kotizo, inkluzive: £ 1.10.

Anglujo. En London fondiĝis „Taksiista grupo", kiu kunvenas ĉiun sabaton posttagmeze en Cafe Vimont, 16, Silver St., London, W. C. 1. — Raporto de E. D. Durrant.

Belgujo. La XXVa Belga Esperanto-kongreso okazos en La Louvière dum la Pentekostaj festotagoj (30.—31. majo kaj 1. junio 1936). Kongres-kotizo: 15 belgaj frankoj. Poŝtĉekkonto No. III. 910 de XXVa Belga Esperanto-Kongreso, I, rue St. Joseph, La Louvière. Enlanda fervoja rabato: 35%.

L K. K. starigis tre allogan programon: uzin- kaj muzeo-vizitoj, ekskursoj, sonfilma prezentado, festenoj, baloj, labor-kunsidoj k. t. p., kiu kontentigos ĉiujn belgajn kaj alilandajn gesamideanojn. Plie, ĝi eldonigis belajn glumarkojn kaj belan senpagan faldfolion kun ĉiuj informoj pri la urbo kaj la Kongreso.

Brazila Ligo Esp. eldonis poŝtkartojn kun mallonga gramatiko.

Bulgarujo. Efektiviĝis revo de la Sofiaj kaj de la bulgaraj esp-istoj: En la centro de la bulgara ĉefurbo estos de nun konstanta nesto de l'esperantismo. La esp-istoj havas jam sian propran hejmon en la granda loĝejkonstruaĵo ĉe la str. Alabin 50. Ĉiu samideano, kiu venos el la provinco aŭ el fremdlando, trovos tie ĉi la esperantistan vivon de la ĉefurbo. — La nova hejmo estas reala esprimo de la profunda amo al Espro de la mortinta samideanino Smaragda Noĵarova, longjara sekretariino de la Esperantista Societo en Sofia. Post sia morto ŝi lasis testamente 100.000 levojn al la nomita societo. Dank' al tiu nobla faro la bulgaraj esp-istoj nun havas sian propran hejmon.

Ĉilio. Mortis sinjoro Luis E. Sepulvedra, unu el la plej konataj esp-istoj de suda Ameriko. Li estis unu el la plej konataj korespondantoj, kiu dum multaj jaroj dissendadis milojn da leteroj en ĉiujn partojn de la terglobo kaj propagandis Esperanton.



Kastelo Kreuzenstein proksime de Wien.

Danujo. Dana E-Instituto translokigis siajn Internaciajn Feriajn Kursojn E-ajn al Int. Altlernejo en Helsingör (Elsinoro), loko konata el „Hamleto". Tiu altlernejo estas unika en sia speco, ĉar ĝi estas vere internacia, instruante per ĉiuj modernaj lingvoj pri ĉiu ajn kultura afero. Ĝis nun E. ne estis aplikata tie.

La Int. E-aj kursoj okazos en la venonta somero: 19. 7.—5. 8.

La kursojn aranĝas kaj garantias Dana Esperanto Instituto. — Detalaj informoj riceveblaj de s-o L. Friis, Sekretario de Dana E-Inst., Thyrasvej 15, Aabyhöj, Danlando.

Francujo: „Frateca Esperantista Movado" eldonas de januaro apartan bultenon, 4, Rue Lammandé, Paris 17.

Germanujo: Germana Esperanto Asocio (Deutscher Esperanto-Bund) eldonas depost 1936 kiel sian organon la monatajn „Bundesnachrichten". Redaktoro: Kurt Walther, Dresden, N. 23, Burgsdorff-Str. 30. — Nova adreso de la asocio: Dresden, N. 6, Oppell-Str. 50.

Germanujo. 11-aj Olimpiaj Ludoj en Berlin. Fondiĝis komitato sub s-ano Walter Dempwolff, Essener Str. 13, Berlin NW 21, nomita de Germana E. — Asocio. Dum O. L. funkcios informejo en Tramondo-vojaĝoficejo Friedrich Ellersiek, Saarlandstr. 18, Berlin SW 11. Informojn kontraŭ resp. kup.

Hispanujo. Manresa. Kun la XVIII-a Kataluna Esperanto-Kongreso en Manresa, la 31. majo, 1.—2. junio 1936 okazos la XVII Internaciaj Floraj Ludoj t. e. poeziaj kaj prozaj literatur-konkursoj, unuavice ordinaraj, kantantaj Amon kaj aliaj, dediĉitaj al diversaj temoj. Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la Naturan Floron kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo. — La konkurson partopreni rajtas esperantistoj el la tuta mondo. Detalan programon kun kondiĉoj sendas: Kataluna Esperantista Federacio, Valencia 245, Barcelona.

Ĥinujo, jam 30.000 esperantistoj. Laŭ la lastaj statistikoj pri la esperantista movado en Ĥinujo, pli ol 30.000 ĥinoj finis jam kurson de Esp-o. Ekzistas nun en tiu lando pli ol 50 grupoj kaj 5 E.-ĵurnaloj.

Italujo. Itala Ministerio de Gazetaro kaj Propagando malfermis konkurson inter la radio-aŭskultantoj de italaj raportoj pri l'turismo por la plej bela, maksimume 100 liniojn ampleksanta artikolo pri Italujo. Oni povis ĝin verki en unu el la sekvantaj lingvoj: franca, angla, hispana, germana, holanda aŭ en Esperanto. K premioj por la aŭtoroj de la premiitaj t estis destinitaj kvin senpagaj ir-reiraj b por fervoja vojaĝo tra Italujo kun hotelkup por senpaga restado. Rezultaton oni diskon perradie de la Roma sendstacio ankaŭ Esperanto la 21-an de Aprilo 1936 je 19-a h kaj 5 minutoj M. E. T.

Japanujo. Kongreso, kiu ne okazis. „Laborista Esperantisto" devis okazi ferenco en Kobe (Japanujo) inter delegitoj la japanaj kaj nederlandhindaj navig kompanioj.

La Japanoj volis uzi sian propran ling la Nederlandanoj la anglan. Ĉar ambaŭ sistis je siaj postuloj, la necesa kaj urĝa ferenco ne povis okazi.

Kiom da kongresoj **tamen** okazas en tiaj konstancoj kaj estas **fuŝataj** pro la ling malhelpaĵoj?

Jugoslavio: „Laborista E.-Soc." en Ljubl aperigis novan E.-kurson por komercistoj radika metodo. Anoncu vin!

9. Jugoslava Kongreso de E. en Ljubl 31. V.—2. VI. Kotizo 25 Din. al „Klub esper tistov, Ljubljana".

Nederlando. Hago. S-ro Ravestein (Po nalaan 55, Hago) la unuan fojon mont publike en Haga sekcio de LEEN sian film pri 27. Univ. kong. de E. (Milano, Firenz Roma, Napoli, Malta, Tripolis, Palerm Genova) kun granda sukceso. La filmo ha nederlandan kaj Esp.-tekstojn. La prezent daŭras 1½ horojn kaj s-ro Ravestein est preta, montri sian filmon ankaŭ aliloke, se o invitas lin, kiel faris Bruselo, Antverpeno Brugge.

Nederlando. En Utrecht grandaj sukce atingitaj per komuna penado de s-ino Isbrück pastro Cseh kaj sam. J. Glück. Okazis m atentataj paroladoj pri la Cseh-metodo

Aŭstria Radio-sendstacio sur Bisamberg.

De Franz Vasta, Wien.

Norde de Vieno, trans Danubo sur Bisamberg, leviĝas Radio-sendstacio de Aŭstrio, unu el la plej modernaj de Eŭropo. Konstruita en 1933, ĝi elradias elektro-ondojn kun energio de 100 kilovatoj.

Ĝia karakterizaĵo estas la du ŝtalturoj de 130 m alteco, leviĝantaj kiel elegantaj pingloj al la ĉielo. Supre kaj malsupre ili estas maldikaj, dume la mezo atingas larĝecon de 7 m. Oni kvazaŭ ricevas kapturniĝon, aŭdante, ke tiuj gigantoj ne ripozas sur masiva muro, sed sur kugloartiko. La inĝenieroj, kiuj ilin konstruis, elkalkulis, ke la ŝtalmastoj staras pli sekure, se ili havas okazon, iom cedi al la blovanta ventego. Tiam la kabloj je unu flanko de la masto iomete streĉiĝas — kaj ĉio estas denove en bona ordo. La kvar streĉ-kabloj povas elteni ŝarĝon de 160 tunoj, dum la tuta anteno kun kvar kabloj pezas „nur" 50 tunojn.

La okcidenta masto-giganto estas la efektiva anteno de la sendstacio. En tia anteno fluas la fortegaj elektropuŝoj, kiuj estigas la strangajn ondojn de l'etero, portantaj en nian radio-ricevilon kanton, muzikon kaj parolon. La dua, orienta ŝtal-turo havas specialan taskon. Ĝi ne „sendas" elektro-ondojn, sed „reflektas" kvazaŭ kiel spegulo la elektran energion, kiun ĝia kunulo disradias, okcidenten. La aŭstria sendstacio sur Bisamberg situas ja proksime de la orienta limo de nia ŝtato. La dua, orienta ŝtalmasto devas do respegule direkti la radio-ondojn okcidenten al la ceteraj liglandoj de Aŭstrio.

La du anteno-mastoj de la sendstacio estas plurfoje ruĝe-blanke-ruĝe lakumitaj. Tion oni ne faris pro tio, por doni al ili „aŭstrian" aspekton, sed tia kolorigo servas antaŭ ĉio al la aviadistoj. Oni povis konstati, ke la grizaj, nekoloritaj ŝtalmastoj malbone kontrastas kontraŭ la pluvonuboj; ili do facile povus endanĝerigi la trafikon per aviadiloj, despli, ĉar la aŭstria flughaveno situas ja ne tre malproksime de la sendstacio. Tial oni okulfrape lakumis la du ŝtalmastojn de la radio-stacio. Krome du rotaciantaj, ruĝan lumon elradiantaj reflektoroj avertas la aviadistojn ankaŭ dumnokte.



Sed la anteno estas nur la fina ĉen-ero en la vico de mirakloj, kiuj kondukas de la mikrofono de **Ravag** (Radio-Verkehrs-A. G.) en la urbo- centro de Wien trans la sendstacion ĝis la laŭtparolilo de l'aŭskultanto. Ilia peranto estas la grandiozaj Radio-instalaĵoj de la sendstacio sur Bisamberg: la impona Diesel-halo kun siaj du kvincilindraj energi-maŝinoj po 500 ĉevalpovoj. La sendstacio estas funkciigata per propra elektro-energio; ĉefaĵo estas, ke ĉiam sufiĉe da kruda oleo estu disponebla. Kun mirego la vizitanto staras antaŭ vitra polipo, kiu de la gvidanta teknikisto estas klarigata kiel hidrargo-vapora transformilo de la alttensia alterna elektrofluo je kontinua, samsenca fluo de 13.000 voltoj.

Tio vere estas teknika majstraĵo; pripensu nur, ke vi en la loĝejo disponas nur pri elektrofluo de 110 aŭ 220 voltoj. Sorĉa verko estas la efektiva transmisia instalaĵo kun siaj „sep ŝtupoj" — por la laika kvazaŭ libro kun sep sigeloj. Sed tiaj majstro-verkoj de la tekniko el vitro kaj kupro ravas ankaŭ tiun, kiu ilin ne komprenas. Kaj tie troviĝas la **komando-estrado,** estranta la ondojn de la etero; pli ol 100 kabloj tien kondukas kaj ebligas la kontaktigon de preskaŭ ĉiuj partoj de la sendstacio. Kontrol-instalaĵoj permesas daŭre observi la funkciadon de la komplikaj aparatoj.

Fine ni rememoru honore la nomon de l'viro, laŭ kies planoj oni konstruis la grandan Radio-sendstacion sur Bisamberg: estas **Prof. Dro. Gustav Schwaiger,** la tekteknika direktoro de Ravag.

La sendstacio de Aŭstrio sur Bisamberg ne nur estas por ni ŝatata peranto de kler-igo kaj spirita distrado, sed krom tio, ĝi fariĝis **impona heroldo de la altkvalita, kultura misio de nia patrujo.**

la urbo Praha. Antaŭ kaj post la paroladoj eris proksimume cent artikoloj en multaj zetoj. La gazetraportoj ampleksis 100 ĝis 300 eslinioj. La jurnalo „Utrechtsch Nieuwsblad" ondukis E-rubrikon, redaktatan de la ĉef-daktoro mem, s-o d-ro Goedhart.

La redakcio de W i j, grava nederlanda ilu-ita gazeto, kiu havas esp.-lingvan paĝon kaj ricevis jam multajn poŝtaĵojn el ekster-do, decidis al ĉiuj, kiuj sendos al ĝi antaŭ 1-a de majo bildkarton el sia lando, re-mpenci per ilustrita karto el Nederlando kun -a surskribo. La plej malproksima sendanto evos 25 guldenojn (= 50 sv. fr.) kaj inter ceteraj sendantoj estos lotumita sumo de uldenoj. La celo de la redakcio estas ricevi ndan bildmaterialon por sia gazeto helpe Esperanto: oni superŝutu la redakcion de j. (Adreso: Red. W i j, Hekelveld, Amster-, Nederlando.)

Novzelando. La „Oficiala Bulteno" de Z.E.A. raportas pri multo da kvieta, sed da laboro. Nova Patrono estas H o n. A. Hanan, kanceliero de Universitato de zelando. Oni esperas, ke la nova novze-da organo „L a I n t e r n a I d e o" helpos igi la movadon. La sekretario de N. Z. E. A. s sam. W. H. K i n g, Room 106, G. P. O. ding, Wellington, C. 1.

Rumanujo. Rumana E.-Societo, St. Dr. Istrati o. 10, Bukuresto, petas materialon por pozicio. Urĝas!

Porhejmaj Taskoj

de la E-kursanoj el Radio-Wien

Vieno, la urbo de muziko.

Vieno havas la plej belan ĉirkaŭaĵon el grandurboj. La periferio de la urbo, kien povas alveni en malmultaj minutoj per o aŭ per subtera fervojo, pli similas paron ol grandurbon. Tiu cirkonstanco as la speciale sentimentalan psikan vivon la muzikistoj. Ĉar ni vidas, ke la plej aj majstroj de la muziko estis altirataj Vieno kaj tie kreis siajn plej eminentajn ojn.

Vieno, situita en la koro de Eŭropo kaj en kipunkto de grandaj stratoj de okcidento oriento kaj de nordo al sudo, unuigadis n diversajn popolojn, kiuj vivigadis la on de la urbo kaj influadis ĝian kulturon siaj vivmanieroj, scioj, artoj k. t. p. Tial aŭ estas klarigeble, ke la plej multaj aj simfonioj estis komponataj en Vieno, ili estas la esprimo de la sentoj, kiujn la aj komponistoj ricevis tie per la beleco la kamparo kaj per la harmonio de multaj vivantaj popoloj. D-ro Max Höfer.

Vizito en la plej granda sonfilm-ateliero en Aŭstrio.

Ni ekkaptis volonte la okazon partopreni en ado tra la sonfilm-atelieroj de Tobis-cha, la solaj en Aŭstrio. Tie ĉi la aŭstriaj filmoj kiel „Siluetoj", „Maskofesto", la lernejo", „Epizodo" k. a. estas produk-. La tereno, tre granda kaj ampleksa, ofte as uzata por eksteraj fotografadoj kaj tiel emple povas okazi, ke Riviero, la suna suda loko de Franclando, estiĝas sur Rosenhügel Vieno. Ni havis la gvidadon ĝuste en tiuj oj, dum kiuj la fama reĝisoro Reisch son-as sian plej lastan verkon „Siluetoj". — iu estas allasata al la filmigoj, ĉar unuflanke aŭtoro ne ŝatas, se io pri lia filmo estas likigata tro frue, aliflanke ĉar la plej mal-a brueto ĝenas.

Tial ni nur povis vidi kelkajn malgrandajn, novajn dometojn, kiuj estas simple kon-itaj sur la subĉiela tereno por la filmo uetoj", prezentantaj parteton de Grinzing Vieno. Malgraŭ, ke oni tre klopodas, ne multe vidigi kaj malkaŝi al ekstere star-oj la sekretojn de filmarto, ni havis tamen zon, vidi en la interno diversajn inter-ojn. La halo por farado de sonfilmoj havas ĝecon de 40 metroj, krome ĝi estas 24 me-ĝis larĝa kaj havas konstrualtecon de 12 metroj. Ĉi tie estas ankaŭ hejtebla akvo-baseno, kiu estas 35 m longa. Neturneblaj lumigiloj estas fiksitaj sur la plafono. Ĝuste nun novaj dekoracioj estas konstruitaj, kiuj prezentos, se ili estos finkonstruataj, modernan „bar"-lokon. Diligentaj manoj ĉi tie klopodas konstrui en mallonga tempo ĉion laŭ la film-tekstlibro. Grete Mayrhofer, Klosterneuburg.

Anekdoto.

„Kiel ĉagrenite vi aspektas de kiam vi estas edziĝinta. Kie do premas vin la ŝuo?" — „Sciu, kara amiko, tio estas verdire la pantoflo."

Hilde Püschner, Tyssa, ČSR.

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

Al la delegitoj! Por la nova jarlibro 1936 (aperonta baldaŭ) bonvolu afable tuj sendi al mi jenajn datojn: Viaj nomo, profesio, adreso, ejo de Loka Grupo, tago kaj horo de la kun-veno. Dankon. Weber.

Delegitoj, pagintaj jam por 1936:

Afritz, Antonie Listner; **Alt-Dietmanns**, Fred Pižl; **Bisamberg**, Hugo Steiner; **Braunau a. I.**, Josef Salzlechner; **Ebelsberg**, Josef Neuhofer; **Ebensee**, Max Heissel; **Gr.-Siegharts**, Heinrich Nowotny; **Klagenfurt**, Otto Müller; **Knittel-feld**, Rudolf Pawlik; **Krems**, Franz Stanke; **Linz**, Franz Mraz; **Mauerkirchen**, Leopoldine Koneberg; **Mörasing**, Josef Brenneis; **Rodaun**, Franz Braun; **Salzburg-Parsch**, Dr. Fr. Christa-nell; **Schruns**, **Hans Neyer** (D), Grete Obexer (V. D.); **Sigmundsherberg**, Dr. Hugo Scheuer (D.), Eduard Bauer (V. D.); **Stammersdorf**, Franziska Zeitler; **Steinakirchen a. F.**, Hans Zant; **Steyr**, Hans Zeller; **Unter-Tullnerbach**, Josef Schamanek; **Waidhofen a. d. Th.**, Paula Pirchan; **Wien**: Otto Drößler, Max Rudolf Frey (studentoj), Heinrich Kellner, Hans Steiner, Luise Ziwutschka; **Wieselburg**, Ale-xander Schwarz.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Al la Landaj Asocioj.

Karaj Samideanoj.

Vi jam scias, ke S-ro KREUZ mortis dum la nokto de la 31a de Januaro. Du tagojn antaŭ sia morto, li, ankoraŭ plena de vivo, laboris senripoze por nia afero.

UEA ŝuldis al li nur la salajron por januaro, kaj oni pagis ĝin al lia vidvino. Plie, mi prenis sur min la decidon, ke UEA pagos la enterigo-kostojn (ĉirkaŭ 500 svisaj frankoj).

Sed ĉu ni estas kvitaj kontraŭ li? Ne parolante pri lia antaŭa agado, li fariĝis en 1925 ĝenerala sekretario, kaj en 1930 direktoro de la Internacia Centra Komitato. En 1933 li fariĝis dua, en 1934 sola direktoro de UEA. Li laboradis senĉese per siaj tutaj fortoj por la Esperanto-movado, li zorgis pri ĉiuj Universalaj Kongresoj depost 10 jaroj, li estis la centra punkto de nia propagando kaj poste de nia Centra Oficejo. Ĉu vere ni estas kvitaj kontraŭ li kaj lia vidvino, paginte nur la salajron ĝis la lasta tago de lia labortempo?

Se UEA estus riĉa, mi estus proponinta pli donaceman decidon. Laŭ mia opinio, UEA devus doni al la vidvino 1000—1500 sv. frankojn (inkl. la enterigokostojn) pro dankemo kaj memoro al nia eminenta Direktoro. Sed vi konas nian financostaton. Eĉ por la jarlibro 1936, kiu tamen estas tiel necesa por nia propagando, ni havos apenaŭ la necesan monon — se ni havos ĝin —, kaj monrezervoj ne plu ekzistas. Jam la enterigokostoj estus grava breĉo en nia budĝeto. Kaj tamen ...

Kion do fari? Mi turnas min al la Landaj Asocioj, kies unuiĝo estas UEA, kaj mi diras: Nia Direktoro, la centra punkto de mia organizaĵo, mortis post longa fruktodona kariero. En ĉiu alia Societo oni donacus al la vidvino kelkajn monatojn da salajro: tion ni ne povas fari, kaj la vidvino postulas nenion, kvankam

Naciaj kostumoj el Wachau.

li ne estis asekurita. Sed en tia cirkonstanco la solidareco inter samideanoj devas sin manifesti, aŭ ĝi ne ekzistas. Ĉiu el niaj Asocioj sendu al nia Centra Oficejo iun mondonacon laŭ sia povo. Tiamaniere ni pruvos, ke ni ne forgesas niajn kunlaborintojn; tiamaniere ni meritos, ke la klopodoj de niaj mortintoj utilu al la nepra venko de la ideo!

La Prezidanto
L. Bastien.

Ni petas, ke ĉiu aŭstriano donacu sian oboluson. Aŭstrio ne postrestu! Ni publikigos la donacliston:

1. listo:
Steiner Hugo S 10.—.

Innsbruck: E.-Klub (nova adreso) Gasthof „Goldener Hirsch", Seilergasse 9.

Knittelfeld. Nia nova grupo bone funkcias kaj jam nombras 21 membroin.

Krems a. d. D. La 28. de Jan. okazis en la konvikto de Piaristoj la ĝenerala kunveno de nia E-grupo. La nov-elektoj: Prezidanto: Reg. kons. Gottfried Kern, vicprez. Franz Stanke, sekr. Josefine Protiwinsky, vicsekr. Josefine Decker, kas. Marie Krautzberger kaj kelkaj konsilantoj. — La grupvesperoj okazas de nun en la konvikto de Piaristoj ĉiusemajne marde je la ½8 vespere.

Linz. Esperantogrupo. La Zamenhof-festo en decembro 1935 kunigis 42 personojn. Tiu jam ĝojiga nombro estis ankoraŭ superita la 15-an de februaro okaze de la aranĝita karnaval-vespero, kiun ĉeestis 82 personoj. Krom kelkaj lernantoj ĉiuj estis geesperantistoj. Ĉeestis ankaŭ gesamideanoj el Wels, Vöcklabruck, Steyr, Ebensee, Riedaŭ kaj de la laborista esp-a klubo Linz. Per flagoj ornamita salono, riĉa programo, muziko, gajhumoraj prezentadoj, kiuj plenigis 2 horojn. Modela kunlaboro de ĉiuj agintaj. Plej grandan laŭdon meritas ge-sinjoroj Kugler pro la multa laboro farita kaj kiel ĉefaj aktoroj. — Baldaŭ komenciĝos la unuaj preparaj laboroj por la vizito de la kongreskaravano. Wannek.

Tirolo. Laŭ iniciato de E.-Klubo Innsbruck ni konsentas starigon de Landa Reprezentanto d-ro Anton Karner, Hötting-Innsbruck, Höttingerau 44 kaj anstataŭanto: Roland Kühbacher, Innsbruck, Mandelbergstraße 3/II. — Post la klopodadoj de s-ano Buenting el Nederl. Hindujo kun niaj tirolaj s-anoj nun funkcias kursoj en: Innsbruck (gvid. Buenting, 40 pers), Hall (d-ro Karner, 16 p.), Kufstein (Buenting, 9 p.), Schwaz (Buenting, 17 kaj 8 p.), Telfs (Wulz, 9 p.), Wattens (Ed. Pfeifer, 6 p.), Wörgl (Buenting, 25 p.). Gratulon.

Tirolo. Sam. F. W. Buenting el Batavia, ned. Hind., kuraĝigita de siaj pasintjaraj propagandsukcesoj, disvolvas ankaŭ nun en nia lando tre viglan esp. varbadon, gvidante laŭ Cseh-metodo serion da kursoj en la ĉefurbo kaj en la provinco. Multaj gazetoj, inter aliaj „Volks-Zeitung", „Innsbrucker Nachrichten", „Innsbrucker Zeitung", „Haller Lokal-Anzeiger", „Schwazer Lokal-Anzeiger" raportis

Kablofervojo supren Rax-monton (2009 m).

en artikoletoj kaj notetoj. La provlecionoj okazis en Innsbruck, Schwaz, Hall, Wattens, Kufstein, Wörgl kaj Telfs.

Wels. La 28-an de jan. okazis ĝen. kunveno de ĉi-tiea E-klubo. Nova estraro: Karl Franz — prezidanto, Ernst Moser — kasisto, Hermann Wiedenhofer — sekretario. — La grupa vivo estas lastatempe tre vigla, ĉar krom la ĝisnunaj neutralaj ankaŭ la katolikaj kaj iamaj laboristaj esp-istoj montras nun firman volon al energia kaj konkorda kunlaboro.

Esperanto-Klub, Wien, I., Wallnerg. 6. Nia klubvivo plivigliĝas. De 18 h 30—22 h ĉiun mardon nun kunvenas ĉiam eĉ pli ol 50 personoj. Gastoj bonvenaj!

Wien. Katolika Unuiĝo Esp. Vesperoj por spirita enpensado en la kapelo de kath. Gesellenverein, VI., Gumpendorferstraße 39: Vendrede la 13. kaj sabate la 14. de marto je la 19. h. Eklezia gvidanto: P. Hasenhütl OFM. Temo: Paco en Dio. Dimanĉe la 15. de marto je la 10. h Sa. Meso kun prediko. — Ĉefkunveno en Schottenstift (teretaĝa ĉambrego), I., Freyung 6 (eniro apud la apoteko), dimanĉe la 22. de marto je la 16 h 30, antaŭe je la 16 h solena Sa. Beno (geedziĝa kapelo). — Post la tagordo amuza vespero kaj altinteresa lumbildparolado pri Palestino! Kora invito al ĉiuj!

Mortis S-ino **Käthe Mohr, nask. Seidl,** vidvino post burĝlerneja direktoro, en la 63-a jaro de sia vivo. — Al la familianoj ni esprimas nian plej profundan kondolencon.

Bona propagando.

Nia s-ano Bozidar Csenár, Unterpullendorf, Aŭstrio, fiksigis sub la direktilo de sia biciklo sufiĉe grandan verdan stelon el lado. Per tio li varbas por E., ĉar multaj homoj demandas lin pri la stelo. Unu el la multaj senkostaj bonaj varbeblecoj!

Wien. Esperanto-Societo „Danubio" transloĝiĝis en novan societejon, VIII., Alserstraße 63 a (restoracio Frey) kaj aranĝis tie la 10-an de februaro inaŭguran vesperon, ĉe kiu ĉeestis pli ol 80 personoj. Parolis unue la klubestro K. Cech pri kluba vivo, d-ro E. Pfeffer pri la taskoj de Espa hejmo kaj nia plej proksima laborprogramo en Wien, prof. H. Jokl pri Comenius univ. prof. Sirk pri pasintaj reformtendencoj en nia lingvo, Fr. Vasta pri plastika filmo. Grandan aplaŭdon rikoltis sam. G. Schlerka per siaj esp-aj kaj germanaj humoraj kantoj ĉe akompano de liuto. — Ni deziras al „Danubio" en ĝia nova hejmo multe da sukceso!

La **fakgrupo „Esperanto"** de „Wiener Volksbildungsverein", Wien, X., aranĝis sabate, la 8. II., en la bela, moderna teatrosalono de Komensky-lernejo, X., Wielandgasse, grandan amuzvesperon. La E-fakgrupo estis subtenata de la mandolinorkestro de la muzik-unuiĝo „Immer Vorwärts", kiu, direktata de orkestra direktanto F. Staudacher, en grandioza maniero ludis muzikaĵojn klasikajn kaj modernajn kaj ricevis entuziasman aplaŭdon. Instruisto F. Divisch prezentis E-kantojn kun akompano de liuto, kaj la ĉefpunktojn de la programo formis du unuaktaj E-teatraĵoj, bonege luditaj de anoj de la fakgrupo, kaj ege aplaŭditaj de la aŭskultantaro. S-ano H. Weinhengst parolis la interligajn vortojn kaj donis al la ĉeestantoj, kiuj ne scipovis E-on, germanlingve mallongajn klarigojn pri la enhavo de la teatraĵoj.

R. Kreutel.

Librejo R. Lechner, Wien, I. Graben 31 informis nin, ke ĝi deziras instali Esperantofakon kaj jam sendis 3 oficistojn lerni Esperanton. La firmo, kiu havas la plej belajn elmontrajn fenestrojn sur la plej frekventata loko en Vieno, jam ekfunkcias por la esperantistoj. Laŭ peto de la firmo, ni volonte publikigas ĉi tiun informon.

Recenzoj

Literatura Mondo, Budapest IX, Mester-u. 53 malaltigis siajn prezojn je 20—50%. Mendu prezaron senpage!

Edmond Privat „Interpopola Konduto", 20 × 13.5 cm, 154 pĝ. Eld Literatura Mondo, Budapest. Prezo svfr. 3.—, bind. svfr. 4.50 plus 10% sendkostoj.

Originala verko de nia pioniro d-ro Edmond Privat. La unua libro de la artoscienca serio en falsa ledo, sur senligna papero. 5. de Aela 1935. Recenzo sekvos.

Dicionario Portugues-Esperanto. Redaktis: A. Couto Fernandes, Carlos Domingues kaj L. Porto Carreiro Neto (L. K.) —Brazilo, Rio de Janeiro 1936, eldonejo: Imprensa Nacional.

Saluton kaj gratulon al la brazilaj samideanoj! La ĉefa antaŭkondiĉo por enpenetro de nia lingvo en ĉiujn mediojn de la brazila socio, por grandstila tradukado de la trezoroj de l'portugala kaj specife brazila literaturo, nome la ekzisto de laŭeble kompleta kaj fidinde prilaborita portugala-esperanta vortaro, dank' al la merito de l' tri nomitaj Aŭtoroj jen estas brile solvita. Sur 488 paĝoj estas prezentata al la uzantoj la riĉeco de nia esprimaro, la diversaj ebloj de Esp-o precize redoni ĉiun apartan nacian vorton aŭ teknikan terminon. Aparta listo de nomoj propraj, geografiaj, historiaj kaj literaturaj kompletigas la vortaron; la nomoj de la Verkintoj, ĉiuj fame konataj pioniroj de nia afero en Brazilo, garantias la altrangan kvaliton de la laboro. Ni tutkore deziras grandan kaj rapidan disvastiĝon al tiu ĉi fundamenta verko por la bono de nia afero en la tuta Brazillando!

Dr. Emil Pfeffer.

„For la militon", nova rondeto en Barcelona, eldonis 500.000 glumarkojn „For la militon", 500 po 1 Pes. Adr.: L. M. Ungria, Str. P. Claret No. 130, Barcelona.

„Sed amiko, kiel via vango tiel dikiĝis?"

„Ho, ĝi estas specimeno de sinjorina manlaboro."

„Do la boato renversiĝis kaj poste li ĉirkaŭprenis vian talion, Anjo?"

„Ne patrino, unue li ĉirkaŭprenis mian talion kaj poste la boateto renversiĝis."

Korespondon deziras:

F-ino G. S. **Penterman** (Kg. nro 200), Provenierssingel 9, Rotterdam, deziras koresp. kun 45-jarulo pri ĉiuj temoj.

Fischthaler Josef, Wels, Aŭstrio, hauptpostlagernd, kun gekongres.

Ges-roj James H. **Jackson** (310/I), Mead Cottage, Willaston, Wirral, Britl.

F-ino **Lagènes,** Toulouse, 99 Allée de Brienne, Franc., (22-jara) kun junaj s-anoj.

Weiß Herbert, Berlin-Tegel, Brunowstraße 33 (22-jara mekanikisto).

S-ro **J. Dercks,** Antwerpsche Str. 43, **Bergen-op-Zoom,** Nederlando, kun Vienaj aŭ Aŭstriaj ges-anoj, kiuj partoprenos en la 28-a. Certe respondos!

Rekomendataj:

Cigaroj kaj cigaredoj de
Oesterreichische Tabakregie
famaj kaj preferataj en la tuta mondo p
sia kvalito.

Nia oficiala kongresasekurejo „Der Anke
Wien, I., Hoher Markt 10—11, donas
al la kongresanoj, venontaj el iu Eŭro
Lando escepte Rusujo, por asekuro de pak
oj kaj kontraŭ akcidentoj en la daŭro
1 monato jenajn speciale favorajn kotizo
I. sfr. 2.35 a) por pakaĵasekuro je ŝ 500.—
b) por akcidento: ŝ 2500.— je mo
kaj ŝ 5000.— je daŭra invalideco;
II. sfr. 4.55 a) je ŝ 1000.—, b) ŝ 5000.—
ŝ 10.000.—.
Mendo kaj pago kun la kongreskotizo al L

La ĉapelo **„Esperanto"** el la fabriko
Carl Ceschka & Söhne,
Wien, VII., Kaiserstraße 123.

La tramvojo al **„Pöstlingberg"** en Lin

La termejo **„Warmbad Villach".**

„Aŭstria Festo je honoro de Bruckn
Linz - St. Florian, 18.—21. VII. 1936.

Bad Ischl, la plej frekventata salban
en Aŭstrio.

Hotel de France, Wien, I., Schottenring
Tel. A-17-5-75. Unuaranga familia ho

Venu ankaŭ vi al la fabele bela, m
multekosta **Steiermark.**

KÖB, aŭtobusentrepreno de Oesterr. B
desbahnen, Wien, II., Nordbahnstraße, No
bahnhof.

Suoj ĉiuspecaj por sporto kaj strato, propra
produktado, plej malmultekostaj kie
ankaŭ riparaĵoj ĉe Konrad Goloversnik,
Wien, V., Mauthausgasse 4.
Esperanto parolata.

Solvo de la enigmo el n-ro 2. Paris, Aron
Roman, Imago, Sonor.

Plenigenigmo.
De A. B., Vieno.



kontrolisto
virvesto
pli ol varma
mambestoj
arĥitektura ornamaĵo
aŭstria popolkanto
sciigo
fervojaj aparatoj
kunmetu ok
vortojn kies
meza vertikala
vico nomas elpensint

a a a a a a c e e e e
f g g h i i i i i i j
k k l l l m m m m n
n n n o o o o o o o
o o o o o p p r r r
r r s s t t v v z

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. **Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII.,** Bandgasse 28.